Mór Jókai

La du salikoj de Nagyenyed

Tradukis: László Vizi
Lingve reviziis: Eva Golden

PROPONOJ POR LA LEGADO

Tiu ĉi elektronika eldono estas speciale alĝustigita por legi ĝin sur ekrano de persona komputilo (PC) kaj ĝi estas provita per la foliumiloj Firefox, Opera, Google Crome kaj Internet Explorer. Plej komforte legi oni povas sur "plena ekrano" kiun alĝustigon vi povas atingi premante la funkcian klavon "F11". Ripetante la premon de la sama klavo vi povas reveni al la kutima vidaĵo.

La litergrandecon vi povas grandigi-malgrandigi per kontinue premata klavo "Ctrl" kaj ĉe la numeraj klavoj ekpremo de "+", aŭ inverse "-"; reveni al la ordinara litergrandeco same "Ctrl" kaj ĉe la numera klavaro "0". Via foliumilo rememoros la lastan alĝustigon.

La tradukaĵon mi abunde kompletigis per piednotoj, kiuj unuflanke rilatas al historiaj, geografiaj, sciencaj ktp. faktoj, aliflanke klarigas malofte uzatajn esperantlingvajn vortojn, aŭ novajn derivaĵojn, proponojn. Se vi volas ĝui la rakonton, ne estas konsilinde legi nepre ĉiujn piednotojn, sed male: legu nur tiujn, kiujn vi efektive bezonas por kompreni la tekston.

Mi bone scias, ke la jenan verkon foje jam tradukis hungara esperantisto Jozefo Horváth, **(Legu ĝin!)**, sed mia traduko reprezentas absolute alian tradukan skolon, do mi pensas, ke la diversaj preferoj koncerne artan tradukadon estas utilaj, kaj povas plivastigi la sortimenton de esperantlingva literaturo. Kritikojn, rimarkojn mi ĉiam akceptas kun interesiĝo, sed ne nepre mi konsentos ilin.

Mór Jókai

LA DU SALIKOJ DE NAGYENYED[1]

1.

Inter la urboj Felvinc kaj Enjed[2] la landvojon krucas montara rivereto, kiu nuntempe jam havas firme konstruitan ŝtonponton. Ĉe ambaŭ bordoj de tiu rivereto sin levas po unu grandega saliko, kaj tiuj du arboj rememorigas pri historia rakonto. Sep generacioj vidis kreski ilin, kaj la rakonto herediĝis de la prapatroj al la posteuloj, sed la rememoro pri ĝi restis tiel freŝa, kvazaŭ temus pri la eventoj de nia proksima pasinto.

... Ĝuste cent jaroj kaj kvindek[3] pasis de tiu periodo, kiam la epoko de *kruculoj* kaj *loboncoj*[4] atingis sian pinton: iun tagon la kruculoj, alian tagon la loboncoj trudis[5] siajn dekretojn[6] al la urbo Enjed; se unu el ili forlasis la urbon ĉe iu flanko, la rivaloj[7] invadis ĝin ĉe la alia.

La bonintencaj loĝantoj de Enjed elkore deziris, ke tiuj bravuloj preferu interbatali, ol turmenti pacemajn civitanojn, sed la koncernaj sinjoroj estis saĝuloj, kiuj informiĝis pri la strategia ruzaĵo, ke oni povas venki la malamikojn ankaŭ per neniigo de la nutraĵprovizo en la koncerna regiono. Do en la praktiko ili efektivigis ĝuste tiun strategion.

La regula armeo de la princo[8], la potencaj taĉmentoj de nobeloj, la elegantaj, sveltaj husaroj en lupfelaj manteloj, la plej bravaj libertaĉmentoj, la gvardianoj vestitaj per ruĝaj kaj bluaj uniformoj ekstere, en Hungario[9] partoprenis verajn batalojn kontraŭ la ĉefarmeo de la imperio, kiu konsistis el rajdsoldatoj kun brilaj kirasoj kaj krestoj, el rajdveturantaj piedsoldatoj[10] vestitaj per broditaj buballedoj, kaj el majstropafistoj nomataj "muskedistoj"; sed dise en la lando vagadis sentaŭgaj aventuremuloj, kiuj estis tiel samaspektaj, ke ĝis nun estas konata la anekdoto pri naiva nordregiona slovako, kiu ne povis distingi kruculojn, kaj loboncojn.

La plejparto de tiuj bandoj konsistis el homoj, kiuj ankaŭ mem mizeriĝis pro la milito, kaj la ĉagreniĝo ne lasis por ili elekti ion alian, krom preni falĉilon, hakilon [11], tiel aliĝi al la kruculoj aŭ loboncoj konforme al tio, kiu el la du partioj senhavigis ilin.

Do en hordoj[xx] ili vagadis de urbo al urbo, ĉe cedema loĝantaro rabante, ĉe kontraŭstaro bruligante, ĉe kontraŭatako fuĝante. La bataloj okazis sen pasia fideleco, la venkitoj ofte aliĝis al la venkintoj, do laŭ la pruvoj de Mikaelo Ĉerei[12] troviĝis kelkaj, kiuj kvarfoje aŭ kvinfoje apartenis al la kruculoj, kaj ĝuste tiomfoje al la loboncoj.

Tiu ofta ŝanĝiĝo de la elektita partio grave bridis la klopodojn por atingi militan gloron, ĉar se iu fariĝis fama bravulo, li povis timi, ke la sekvan fojon, kiam lia taĉmento aliĝos al la malamikoj, tiuj estos indulgemaj al ĉiu, nur ĝuste li mem estos pendumita kiel la plej grava celo de ilia venĝemo.

Por eviti tian situacion la bravuloj ĝenerale uzis kaŝnomojn. Tiun ruzaĵon aplikis precipe la loboncoj, kiuj elektis kaŝnomojn neprononceblajn por la kretenaj kruculoj sen risko rompi la langon, do plej ofte fuŝitajn germanajn vortojn eĉ por ili mem nekompreneblajn.

Aliflanke la gravuloj de kruculoj klopodis elekti rumanajn nomojn.

Do, tiutempe por la urbo Enjed kaj por ĝia regiono la plej teruraj malamikoj estis unuflanke *Baliko*[13], la bandestro de kruculoj, kiu loĝis en kaverno ĉe la Intermonto de Torda[14], ĝis hodiaŭ nomata: "fortikaĵo de Baliko", aliflanke la du bandestroj de loboncoj, kiuj kampadis en la regiono Kamparo[15], kaj el kiuj unu havis la strangan nomon: *Trajtzigfritzig*, la alia uzis la romantikan nomon: *Borembukko*.[16]

Kiel strangaj estis iliaj kaŝnomoj, tiel absurdaj figuroj estis ili mem: jen naivaj, jen kruelaj, foje ŝercemaj, alifoje buĉemaj, pri kiuj estis konataj ĝuste tiom da ridindaj anekdotoj, kiom da teruraj historioj, kaj iliaj kaŝnomoj same estis rimedo de edukistinoj por minaci obstine plorantajn infanojn, kiel rimedo de la studentoj en Enjed por petole moki unu la alian.

2.

Tiuj studentoj, ho tiuj studentoj de Enjed estis specialaj knaboj! Kiam kalvinisma knabo fariĝis sufiĉe lerta tiomgrade, ke li jam estis kapabla tranĉi anserplumon por fari el ĝi skribilon, lia patrino plenŝtopis portsakon per bakaĵoj, lia patro aĉetis al li paron da botoj, poste kondukis sian idon al Enjed, starigis lin en la korto de internulejo[17], vangofrapante admonis[18] kaj benis lin, ordonis, ke li fariĝu pastro, profesoro, juĝisto, oficiro aŭ konsilisto, kaj forlasis sian filon. Poste la patro ne plu zorgis pri la ido. La knabo plenkreskis, ekhavis barbon, oni plenŝtopis lin per nutraĵoj kaj sciencoj, izolis lin disde ĉiuj profanaj tentoj, prizorgis lian korpon kaj animon, edukis lin je pieco kaj sano, kaj laŭ liaj meritoj, laŭ lia bonŝanco oni faris el li pastron, profesoron, juĝiston, oficiron aŭ konsiliston, sen ia penado de liaj gepatroj. La internulejo fariĝis por li kvazaŭ patrino.

Tiu respektinda vicpatrino havis ĉirkaŭ kvincent aŭ sescent adoptitajn filojn, kaj ĝiaj enspezoj por eduki la multajn infanojn estis plurcent-mil forintoj[19]; krome ĝi havis plej klerajn[20] profesorojn kvalifikitajn de eksterlandaj universitatoj[21], mondfaman bibliotekon kaj diversajn bienojn, kiuj unuparte instigis la junulojn por esti laboremaj, aliflanke alkutimigis ilin al la kontentiga sento, ke iom ajn modeste, sed tamen ili mem povas vivteni sin per propra klopodo.

En la periodo de nia historio la internulejon de Enjed gvidis rektoro Gersono Tordai Saboo[22], la respektinda klerulo, diligenta esploranto de sciencoj, kiu estis eksterordinare pacema viro kaj persista protektanto de la senmakula moralo.

Se lin ekregis la fervoro inter siaj teruraj kodeksoj[23], li povis distriĝi tiel profunde, ke li ofte bezonis demandi sian edzinon, ĉu hodiaŭ li tagmanĝis jam, aŭ ne; sed antaŭ siaj lernantoj li parolis kvazaŭ senerara fonto de saĝeco. Li ŝatis nur la pacajn sciencojn, kiel ekzemple astronomion kaj mekanikon, aliflanke malrespektis la historion, kiu studobjekto – laŭ liaj vortoj – instruas nenion krom la nomoj de tiuj personoj, kiuj plej diligente mortbatis aliajn homojn, kaj kiu studobjekto glorkantas pri la agoj de pekemaj, sangavidaj, kruelaj personoj, kaj senĉese mensogas, anstataŭ plibonigi la sekvajn epokojn prezentante modelojn de bonintencaj, piaj kaj saĝaj eminentuloj.

La bonulo incitis sian malsimpation kontraŭ la neŝatataj historiaj personoj ĝis tia grado, ke por savi la animojn de siaj lernantoj li eĉ falsis la historion per ordono al la koncerna profesoro, ke tiu prezentu al la studentoj Kleopatron, Semiramison kaj

similajn impertinentajn sinjorinojn, kiel aĉajn, abomenindajn monstrojn, kiujn eĉ imagi estas terure.

Cetere la studentoj neniam rajtis alrigardi virinojn; tiaj vantaĵoj, kiel ekzemple dancado, muziko, en tiu ĉi rondo estis malpermesitaj por ĉiam; eĉ en la preĝejo estis aparta loko por la adoleskaj internuloj tute malantaŭe, kie ili sidis sur lignotabuloj, kaj rigardante ne atingis la altecon de la benkovicoj, por ke ili ne povu okulkontakti kun la knabinoj. Ĉar la firma principo de la respektinda sinjoro estis tio, ke junulo ne bezonas koni virinojn ĝis tiu tempo, kiam li fariĝos matura por edziĝi, do kiam li estos fininta siajn studojn, kaj havos sufiĉajn enspezojn, ĉar pli fruaj renkontiĝoj estus nur vantaĵoj, kaj kaŭzus nenion utilan.

Tiu principo kompreneble estas la plej malpopulara instruo, kiun oni povas prediki por la publika bonstato, kaj estas evidente, ke la plej malmultaj adeptoj de tiu principo troviĝis ĝuste inter la koncernaj personoj, inter la studentoj de Enjed. Kelkfoje oni neeviteble vidas virinan figuron, kaj ekde sia dek-kvara jaro ĝis la dudeka ĉiu knabo estas ravita de iu ajn virino.

Realigi la pedagogiajn principojn de sinjoro Gersono estis precipe malfacile pro la fakto, ke eĉ li mem havis filinon, kaj tiu unusola filino estis tiel bela, ke post duonjara elektado en la tuta urbo oni tamen revenus al ŝi.

Ĉiu studento, kiu ekvidis la knabinon enamiĝis al ŝi, sed vane li enamiĝis, ĉar damnita animo pli facile revenus el la mondo de mortintoj tra la rivero Stikso[24], ol studento povus plenumi tiujn dudek paŝojn ĝis Klara – jen, tiel ŝi nomiĝis.

La duetaĝa domo de sinjoro Gersono troviĝis apud la multe pli alta internulejo. Li mem loĝis en la teretaĝo, ŝia filino en la supra etaĝo, kaj la ŝtuparejo havis ŝlositan kradopordon; do ne povis okazi, ke iu junulo, veninta viziti sinjoron profesoron, hazarde renkontu Klaran, kiun li tamen vane renkontus, ĉar la obeema knabino estis edukita laŭ principoj tiel piaj kaj kontraŭstudentaj, ke ŝi nepre forkurus de li.

Kompreneble ne ĉiu ordinarulo havis permeson eniri la domon de la eminenta profesoro, sed por fideblaj personoj li malfermis sian pordon.

Tiel fideblaj personoj estis *humanissime*[25] Jozefo Zetelaki[26] kaj *humanissime* Arono Karaŝiai. [27]

La unua el ili estis ĉarma junulo kun virineca vizaĝo, speciale favorata de sinjoro Gersono, kiu pensis pri li, ke lia animo estas fermita inter la sciencaj libroj pli perfekte, ol ĝin povus konservi karcero aŭ esenca alkoholo[28]. Li estis ĉiam la unua el la eminentuloj, verkis diversajn poemojn pri iu ajn temo, por li estis egale en kiu versformo. Estas memkompreneble, ke ampoemo ne troviĝis inter tiuj versaĵoj, sed li verkis pri la vintro, printempo, rikoltado, pri la supermaraj fulmoj aŭ ŝtormoj, kaj pri similaj ĉastaj[29] temoj. Krome li scipovis flue paroli la grekan, la latinan, la hebrean kaj la francan lingvojn, detale konis la unuopajn ĉielajn stelojn kaj surterajn florojn, li estis la asistanto de sinjoro Gersono ĉe la fizikaj eksperimentoj, cetere li estis tiel pia junulo, ke li ruĝiĝis kaj mallevis sian rigardon, kiam en mitologia studhoro li devis raporti pri la diino, kiu kutime surhavas tre malmultajn vestaĵojn.

La alia *humanissime*, Arono Karaŝiai, havis ne tre bonajn mensajn kapablojn. Li pasigis la sesan jaron kiel studento, kaj estis tre silentema, pacienca junulo, kiu estis ŝatata de sinjoro Gersono, ĉar lia nomo neniam aperis rilate al diboĉadoj kaj pugnobataloj; kvankam estus grava danĝero, se lia nomo aperus ĉe tiuj aferoj, ĉar la naturo provizis lin per tiaj brakoj kaj ŝultroj, ke oni povus multe rakonti, se li

movus siajn membrojn kontraŭ aliaj homoj. Sed li aplikis sian teruran forton nur en pacaj manlaboroj, kaj fabrikis diversajn fizikajn demonstrilojn por sinjoro profesoro; krome nur tiam li prezentis aliajn movojn per siaj brakoj, se dum la somera feriado la studentoj en la halo de internulejo aranĝis teatrajn programojn pri mitologiaj temoj, – kiuj teatraĵoj okazis kompreneble kun ekskluzive viraj aktoroj, antaŭ vira publiko. En tiuj dramoj Arono ludis Heraklon[30] kaj Jozefo lian edzinon Dejnira-n. [31] Jen, neniu divenus, ke Jozefo ne estas vera virino, kaj estis plezuro vidi Aronon dum la batalo kontraŭ la Centaŭroj, kiam li tute sola surterigis eĉ tridek paganajn duondiojn.

Jam proksimiĝis la tempo de la ekzamenoj, do respektinda sinjoro Gersono Tordai Saboo faris terurajn preparojn por siaj natursciencaj demonstradoj: Kiel fariĝos aero el la akvo? Kiel intergluiĝos la duonsferoj pro la atmosfera premo? [32] Kiel oni povas bruligi aeron? [33] Kiel oni povas dancigi paperfigurojn per elektra ŝargo? Ĉar en la tempo de nia historio tiujn fenomenojn oni admiris kvazaŭ miraklojn. Do li transdonis la ŝlosilojn de la laboratorio al siaj asistantoj, por ke ili diligente preparu la demonstrilojn, kaj li efektive konstatis, ke la du virtaj junuloj jam frumatene estas en la sanktejo de scienco, kaj de tie forpelas ilin nur la malfrua vespero. "Jen, ili estas laŭdindaj, diligentaj studentoj", diris sinjoro Gersono, "vi, sentaŭgaj, paganaj, vantaj, diboĉuloj elektu ilin por modelo, por ke vi fariĝu similaj".

Do, ni malkovru: kion agadas la koncernaj junuloj en la fizika laboratorio? La laboratorio havas mallumigeblan fenestron por efektivigi optikajn eksperimentojn, kaj tiu fenestro troviĝas ĝuste kontraŭ la ĝardeno de la respektinda rektoro. La du diligentaj studentoj atenteme staras antaŭ la fenestro, ili aplikas grandegan astronomian teleskopon ŝovinte ĝin en la rondan aperturon de la fenestro, kaj ili ŝajne observas ion. Ĉu ili eble esploras stelon? Povas esti, sed kial ili turnas ĝian objektivon malsupren? Nun Jozefo enrigardas ravita... "Ho, Dio mia, kiel belege", li suspiras, kvazaŭ li ne povus reteni sin... Ĉu li tamen vidas stelon?... "Nun ŝi plukas rozon. Kiel forte mi dezirus esti tiu rozo!" Jen, temas tamen ne pri stelo!

La diligentaj junuloj – kun la preteksto, ke ili observas stelojn – tuttage okupiĝas pri tio, ke tra la teleskopo ili rigardas la belegan junulinon, Klaran. Kvankam sinjoro Gersono pensas, ke la du studentoj lacigas la okulojn per la mirindaĵoj de la ĉielo, tamen ili amuziĝas sekvante la karan knabinon teleskope al la ĝardeno, al la ĉambro, al la kuirejo, kaj la vidaĵo delektas[34] ilin.

Por Arono tiu amuziĝo estis nur petolaĵo, sed Jozefo tute perdis sian trankvilon; li ne povis forlasi la teleskopon, kaj kiam li longe ne vidis la junulinon, li ne havis apetiton, nokte maldormis, havis inklinon al nenia agado, senĉese suspiris, forgesis ion ajn legitan, li eĉ indignis sinjoron Gersono revante dum ties prelego, ĉar li denove pensis pri la ĝardeno de rozoplenaj laŭboj[35] kaj pri la knabino, kiu kolektas la velkintajn rozpetalojn en la antaŭtukon per siaj blankaj manetoj.

Ankaŭ ĉe la eksperimentoj li faris mallertaĵojn unu post la alia; li rompis, fendis ĉion prenitan, ĉe la demonstrado pri fosforo li alkondukis hidrogenon anstataŭ oksigeno: do preskaŭ eksplodis la tuta klasĉambro.

Sinjoro Gersono ne povis imagi, kio okazis al la knabo. Li ekzamenis, spionadis, sed li trovis nenion suspektindan; ĉar ĝis la momento, kiam li atingis la laboratorion klakpaŝante laŭlonge de la koridoro, jam ĉio estis en ordo, la teleskopoj rigardis al la ĉielo, la pumpiloj kaj retortoj regule funkciis.

Sed Jozefo sentis, ke lia kordoloro senĉese kreskas; kaj la teleskopa iluzio montris la amatan knabinon tiel proksime, ke la ravita knabo etendis la manojn al ŝi, kaj rekonsciiĝis nur tiam, kiam liaj ungoj klakis sur la fenestrovitro. Tiun akcidenton Arono plengorĝe priridis.

En tiaj afliktoj la diabla tento tiomgrade detruis la virtojn de la pia junulo, ke iun posttagmezon li sidiĝis ĉe la tablo, kaj – eĉ konfesi tion estas terure – li verkis ampoemon. La poemo enhavis versojn laŭ la stilo de Sapfo[36], kaj ĝi priskribis ĉion belan, kio ekzistas sub la suno. Kiam Jozefo deklamis ĝin al Arono, tiu asertis je honorvorto, ke li eĉ informon ne aŭdis ankoraŭ pri poemo tiel bela.

Foje, vespere, ĉe plenluno la du junuloj revante elrigardis tra la fenestro de la laboratorio, sin apogante per la kubutoj sur la fenestrobreto, kaj ili babilis inter si.

– Kiom bone estus, se Klara povus legi tiun poemon! – diris Arono.

– Hm! – respondis Jozefo. (Ne temis pri simpla afero, ĉar tiutempe ankoraŭ ne ekzistis sep virinaj gazetoj, en kiuj oni povus publikigi ĝin.) [37]

– En via rolo, mi nepre solvus, ke ĝi atingu ŝiajn manojn.

– Sed kiamaniere?

– Ĉi tie mi ĵetus ĝin en la ĝardenon.

– Jes ja! Sed la vento eble forblovus ĝin de la ĝardeno, ĝi falus en la korton, kaj ĝin trovus la respektinda sinjoro.

Tiam sekvis la vico de Arono por diri, ke "hm".

– La afero povus okazi tiel, diris Jozefo kun suspiro, ke la bele kunfaldita letero estu kaŝita inter la florantaj rozoj, por ke nur ŝi mem trovu kaj legu ĝin, kiam ŝi frumatene elvenos kolekti la velkintajn petalojn.

– Tio ja estas facila afero – respondis Arono. Tra la jena[38] fenestro per ŝnuro oni povus grimpi malsupren ĝis la muro de la ĝardeno, de sur ĝi oni facile povus salti en la fositan ĝardenon. Por reveni oni povus grimpi supren sur tiu arbo, poste denove per la ŝnuro.

– Kion vi pensas? – teruriĝis Jozefo, – ĉu mi mem grimpu malsupren el la fenestro de la internulejo? Ĉu mi mem trapasu nokte fremdan barilon?

Eĉ Arono ektimis la ideon.

– Mi ja ne diris, ke vi mem faru tion, mi diris, ke tion *oni* povus plenumi facile...

Jozefo longe silentis.

Poste li subite demandis:

– Ĉu vi ne scias ion pri longa ŝnuro en la proksimo?

– Mi ja scias, ke la iama ŝnuro de la sonorilo troviĝas en la subtegmento.

Alportu ĝin.

Arono alportis la ŝnuron, sur ĝia fino li faris sidlokon el fajrobatilo[39], sidigis Jozefon sur ĝin, volvis la ŝnuron ĉirkaŭ la fenestrokrucon, prenis ĝin per siaj fortaj manoj, kaj mallevis sian amikon ĝis la ŝtonmuro. Dum la operacio Jozefo tute ne ŝajnis timi pro tio, ke li povus eĉ mortfali, se la ŝnuro elglitus el la manoj de Arono; li timegis nur tion, ke iu ajn povus rimarki lian agadon.

Sed lin rimarkis neniu. Li povis grimpi tra la muro, kaŝi la poemon inter la rozoj, kaj helpe de Arono li denove atingis la fenestron de la laboratorio sen akcidento; nur fininte ĉion la junuloj ekgapis unu al la alia: kiel freneze ili agis.

La sekvan tagon ili ne kuraĝis interrigardi, des pli ne kuraĝis rigardi tra la teleskopo. Kvazaŭ krimuloj, kiuj faris teruran murdon, ili evitis eĉ la lokon de la "krimo", kaj matene kun batanta koro ili aŭdis la klakpaŝojn de la botoj, en kiuj proksimiĝis la respektinda sinjoro.

Jen, li alvenis. Nek Jozefo nek Arono kuraĝis alrigardi lin, ambaŭ pensis, ke li malkovros la noktan krimon laŭ la mienoj.

– Venu proksimen por kelkaj vortoj, *humanissime*.

Zetelaky aspektis ne kiel vivulo, sed kvazaŭ mortino. Li neniel volis alrigardi la instruiston, kiu severe silentis observante lin laŭlonge.

– Mi volis diri nur tion, *humanissime* – diris finfine la profesoro per seka voĉo – , ke la sekvan fojon, kiam vi deziros alporti poemon, venu ne tra la barilo, sed tra la pordo, ĉar vi detruis ĉiujn florbedojn[40] de la ĝardeno. Aliflanke la poemo, verkita de vi, estas ne malbona, nur unu verspiedo lamas.

Kaj la profesoro enmanigis la koncernan poemon al Jozefo, kiu ekdeziris, ke la tero tuj englutu lin kune kun la tuta internulejo.

Klara efektive trovis la poemon en la menciita loko, sed kiel dece edukita knabino, ŝi pensis, ke ŝia devo estas raporti pri ĝi al la patro, samtempe plendante pri la detruitaj florbedoj. La maljunulo tuj rekonis la manskribon de Jozefo, kaj lia komploto[41] tiurilate estis finita. Neniam plu li ricevis taskojn en la eksperimentoj, nek li estis sendita por agadi en la laboratorio.

Sed la studentoj kelkfoje informiĝis ne nur pri tiuj aferoj, kiuj estis en la lernolibroj, sed ili eksciis ion ankaŭ pri tiuj eventoj, kiuj okazadis dise en la lando, kaj la junuloj tute ne klopodis kaŝi sian simpation aŭ malsimpation rilate al la kruculoj aŭ loboncoj, eĉ antaŭ iuj prelegoj, kiam ducent aŭ tricent lernantoj kolektiĝis en la sama ĉambrego, oni povis rimarki inklinojn tiaspecajn, ke la respektinda publiko verŝajne ne restus pasiva gapanto de la afero, se okazus interbatalo.

3.

Baldaŭ montriĝis eĉ eblo por tia batalo. Iun tagon la bandestroj, sinjoraj moŝtoj Trajtzigfritzig kaj Borembukko mesaĝis al la urbo, ke oni tuj sendu al ili cent bovojn, duontunon da lardo, mil panojn kaj dek-du sakojn da kazeo, krome ne forgesu la vinon, el kiu ili bezonas ne pli ol ducent barelojn.

La nutraĵrezervo de la urbanoj tiutempe jam elĉerpiĝis tiagrade, ke ili povis kolekti la postulatan kvanton nur per ekstrema penado, sed kiam la ĉaroj jam estis plenŝarĝitaj, Baliko, la bandestro de kruculoj, informiĝinte pri la afero, venis el la kaverno kun sia taĉmento, perforte rabis la tutan transportaĵon, kaj kunportis ĝin al la Intermonto de Torda.

Kion faru la bonaj loĝantoj de Enjed en tia situacio? Vane ili diris al Trajtzigfritzig, ke Baliko rabis la nutraĵojn kaj trinkaĵon, li vizitu sian kontraŭulon kaj reprenu siajn havaĵojn. Ĉe tiuj argumentoj kolero inundis la bandestron de loboncoj, [42] je honorvorto li promesis brulruinigi la urbon, kaj anstataŭ vino trinki la sangon de la tuta loĝantaro.

La kompatinda loĝantaro ege teruriĝis pro tiuj minacoj, ĉar eĉ la plej sincera bonintenco ne ebligus kontentigi la postulojn, aliflanke Trajtzigfritzig kun sia bando marŝadis jam ne malproksime, kaj laŭ la sorto de la vilaĝoj, vizititaj de lia taĉmento, ankaŭ Enjed povis esperi nenion bonan.

Tiaspeca mizera situacio estis jam bone konata en Enjed. Kiam la loĝantaro informiĝis, ke proksimiĝas malamikoj, ili subite forlasis siajn hejmojn, siajn havaĵojn ili kaŝis en subteraj kavernoj, en sekretaj keloj, sub la fojnostakoj; la

virinoj, infanoj, maljunuloj estis senditaj al la montaro por kaŝiĝi en ĝiaj arbaroj, la fraŭlinoj estis kolektitaj en la kalvinisma preĝejo[43], kaj la batalkapablaj, armitaj viroj okupis ĝian korton, kiu – eĉ nuntempe videble – estis ĉirkaŭbarita per alta ŝtonmuro, kaj provizita per pluraj bastionoj. Tiujn bastionojn konstruigis la gildoj[44], do la organizoj de la lokaj metiistoj. Po unu bastionon konstruigis la honesta gildo de botistoj, la honesta gildo de teksistoj, aparte la gildo de drapmantelistoj, kune la gildoj de tanistoj kaj ŝuistoj kaj tiel plu.[45] Ankaŭ la trezorejoj de la gildoj estis tie en danĝeraj tempoj, kaj samtiel la majstroj kaj submajstroj de tiuj respektindaj organizoj, ja ili havis la taskon defendi la fortikaĵon de Dio per armiloj.

Kontraŭ la preĝejo situis la internulejo, tiu grandega pluretaĝa konstruaĵo kun kvar aloj[46], en kiu restadis sepcent lernantoj, do ili estis tuta armeo, se necese.

Tuj kiam la informo, disvastiĝinta en la urbo, atingis ankaŭ la internulejon, la juneca impulsemo ekflamis en la studentoj: "ni defendos nin, ni defendos la urbon" ili kriis entuziasme, kaj la sekvan tagon, matene, en la studhoro pri kemio respektinda sinjoro Gersono Saboo rimarkis surprizita, ke liaj lernantoj estas armitaj per glavoj kaj lancoj, kaj ili volas fari nenion alian, nur ataki la loboncojn laŭ la komandoj de la profesoroj

Nu, la deziro, ke respektinda sinjoro Gersono Saboo gvidu atakon kontraŭ la malamikoj, estis bela absurdaĵo.

– Ĉu vi freneziĝis, karuloj? – diris la bona sinjoro teruriĝinte – Ĉu mi estas Heraklo aŭ Akileo, ke mi gvidu vin al batalo? Ĉu mi vin edukis tiel, ke vi fariĝu sangavidaj militistoj? Ĉu vi, kiuj ĝis nun tenis skribilojn per la mano, jam volas preni glavon? Ĉu vi, kiuj lernis kanti psalmojn, nun tordas viajn lipojn por batalkrioj? Ĉu tial mi instruis al vi tiom da sciencoj, por ke vi pereu sur la batalkampo sub la armiloj de la malamikoj same, kiel iu ajn barbara soldato, kiu naskiĝis nur tiucele, ke li mortu? [47]

Tiel predikante sinjoro Gersono rimarkis, ke sub la togo[48]
eĉ *humanissime* Zetelaky kaŝas ian glavon, do la profesoro terure riproĉis lin.

Ĉu eĉ via moŝto estas armita? (Kiam li uzis la titolon "moŝto" koncerne studenton, li nepre jam atingis la pinton de sia kolero.) Jen, detruiĝis la regula ordo de la mondo! Ĉu eble okazis iam, ke la adeptoj de poetoj kaj Muzoj, la zelotoj de sanktaj sciencoj, la kamaradoj de liberaj artoj levus armilojn per siaj manoj? – Nu, respondu! Ja via moŝto bone konas la historion, do menciu precedencon, se vi povas.

La demandita studento finfine replikis tiel:

– Kompreneble mi konas precedencon pri tio: kiam la adeptoj de Pajno[49] prenis bastonojn kontraŭ la gaŭloj[50], kaj mortbatis ilin.

Sinjoro Gersono je tiu vorto severe levis la kapon, ĉar la respondo estis frapa. Tio eĉ pli kolerigis lin.

– Kaj kiel aspektos la afero, se mi malpermesos, ke la studentoj aŭdacu preni armilojn, kiam la nobela estraro de la urbo[51] pace klopodas eviti la danĝeron per saĝa diplomatio. Kaj via moŝto, *humanissime* Zetelaki, bone notu, ke nepre respondi ĉiun demandon ne estas konsilinde. – Kaj nun mi ordonas al vi, studentoj, ke tuj demetu ĉiun armilon, ĉar kiu malobeos, tiu senprokraste estos eksigita el la internulejo, kaj li neniam plu rajtos trapasi ĝian sojlon en sia tuta vivo!... Respektindaj sinjoroj juristoj, sonorigu per la fendiĝinta sonorilego!

La sonoro de tiu fendiĝinta sonorilego estis la signalo, kiam oni eksigis iun el la internulejo.

La vortojn de la rektoro sekvis muta silento, kiun interrompis nur la krakanta sonoro de la fendiĝinta sonorilego. La junuloj, kiuj aŭdacus ataki malamikojn sesoble pli multajn, ol ilia propra nombro, je la ordono de la profesoro timeme demetis la armilojn. La sonoro ĉesis, la studentoj okupis siajn sidlokojn, kaj la respektinda sinjoro preninte sian libron prelegis ĝis la fino de la studhoro, kvazaŭ nenio menciinda okazis pli frue. Poste li forpermesis la studentojn, kaj la konfiskitajn armilojn ordonis fermi en la kelon de la preĝejo, por ke neniu povu denove akiri ilin.

Sed nokte, kiam la studentoj rekonsciiĝis el la stuporo[52], kiun vekis en ili la minacaj vortoj de la rektoro, la junuloj denove interkonsentis pri la afero, kaj pro la situacio, ke la armiloj estis neakireblaj, la sekvan matenon, tuj post la malfermiĝo de la pordegoj, la tuta kompanio iris al la bordo de rivereto,[53] tie ĉiu studento dehakis por si pezan bastonon, kaj ili sub la togoj[54] kaŝe enportis kaj sekrete deponis tiujn batilojn en la tenejo de hejtligno. "Eĉ bastono estas taŭga armilo, se taŭga homo svingas ĝin" – ili pensis.

Jam meze de tiu sama tago en la ĉirkaŭaĵo de la urbo aperis la bandestro Trajtzigfritzig kune kun sia taĉmento, ne malpli ol trimil loboncoj entute. La nobela estraro de la urbo delegis ankaŭ la respektindan rektoron, por fari diplomatian viziton ĉe la malamikoj.

Trajtzigfritzig akceptis la delegitojn de la urbo sidante sur ĉevalo; sed la cetera parto de la militformacio trafikis nur perpiede, se ne kalkuli la tri lignokorpajn kanonojn,[55] kiujn trenis bovoj. Ja estis grava demando: ĉu oni povus pafi per ili sen riski la vivon de siaj propraj kamaradoj? Kvankam la taĉmento havis ankoraŭ unu kanonon, faritan el kupro, kiun alia taĉmento intence fuŝis kaj postlasis sur ia batalkampo, kaj kiun la loboncoj trovinte klopodis ripari, sed ne tre sukcese, ĉar okaze de provoj ĝi nur elblovis la bruligitan pulvon anstataŭ elpafi la kuglon.

La taĉmento mem konsistis el brilaj bravuloj, pri kiuj oni ne senkaŭze povis aserti, ke ili estas elektitaj ekzempleroj de sia speco. En la kompanio sin reprezentis ĉiu nacio de la lando; inter ili troviĝis kaj hungaroj kaj rumanoj same, kiel belgoj, serboj kaj ciganoj en la sama grupo. Kelkaj estis nudpieduloj, sed surportis ŝtalan kaskon, aliaj la zonon de la glavingo ĉirkaŭkroĉis ekster la mantelo. Oni povis vidi soldaton, kiu pene portis pezan pafilon kvankam sen ĉano kaj sen celilo. Aliflanke ĉiu el la stranga armeo havis mallongajn, tonditajn lipharojn, por ke okaze de interbatalo oni tamen povu distingi la loboncojn kaj kruculojn, ĉar tiuj lastaj estis tute similaj mizeruloj, ilin markis nur la lipharoj, longaj ĝis la oreloj. La plejparto surhavis nur ĉifonŝuojn, nur iaj-tiaj ranguloj ricevis botojn, ofte eĉ kun spronoj, sed manke de ĉevaloj la spronoj estis utilaj nur por stumbligi ilin, se foje ili eventuale bezonus forkuri.

Do, tiaspeca estis la armeo de Trajtzigfritzig. Tamen, kiu pensas, ke ankaŭ li estis ia mizerulo, simila al siaj subuloj, tiu tre surpriziĝus: lia ĉevalo estis la plej bela besto de eminenta angla speco, li mem surhavis maŝkirason[56], ornamitan per arĝentaj steloj, sub ĝi malhelruĝan veluran jakon kun oraj pasamentoj[57], lian kapon ŝirmis kasko el kupro kun zigzaga kresto, kaj liaj manoj, kovritaj per kvastogantoj[58], ripozis sur la tenilo de longa larĝa glavo.

Kvankam lia malinteligenta aspekto kaj liaj malnoblaj trajtoj evidentigis, ke tiun pompon havigis al li nek lia deveno, nek liaj meritoj, kaj kiom da vestopecoj estis

videblaj sur li, ĉiu el ili havis alian monogramon[59], sidante sur ĉevalo li tamen sentis sin sufiĉe digna por malrespekte paroli al tiuj, kiuj venis perpiede.

La vicestro, Borembukko, estis grandkorpa buĉisto kun osteca senhara vizaĝo, kiu – kontraste al sia ĉefo – ŝajnis aparte zorgi pri tio, ke li estu kiel eble plej malpura. Lia feljako kvazaŭ brilis pro la graso, kaj liaj vangoj kredeble povus fanfaroni, ke ili renkontis ankoraŭ nenian akvon krom pluvo.

Lia unusola armilo estis grandega buĉhakilo, per kiu li povis mortigi bovon per unusola bato.

Do, tiujn eminentajn virojn vizitis la duopa delegacio respekteme demetinte la ĉapelojn, kaj por honorigi ilin pli solene, sinjoro Gersono diris al ili ne mallongan latinlingvan salutparolon.

Trajtzigfritzig alrigardis Borembukkon kaj reciproke, ja ili ambaŭ konis eĉ ne unu latinan vorton, ili tamen ŝajnigis kompreni ĉion.

– Mi ja komprenis viajn vortojn – diris la bandestro rimarkinte, ke Gersono ne parolos plu, kaj li supereme frapadis ties ŝultron. – Kiel vi nomiĝas?

– Mi estas Gersono Tordai Saboo, la rektoro de la bonfama internulejo, kaj mia kunulo estas lia sinjora moŝto Johano Toot[60], la urbestro de la nobela urbo.[61]

– Kial ne venis la gildestro[62] de botistoj?

– Li pensis, ke ne estas konsilinde aliĝi al ni.

– Tamen li nepre devus ĉeesti, ĉar mia armeo bezonas trimil parojn da botoj, kaj estas necese, ke tiuj botoj en daŭro de tri tagoj estu produktitaj, ĉar mi ĵurpromesas[63] je mia nobela glavo, se mia postulo ne plenumiĝos, ĉiu botisto de la mondo pereos pro mia kolero! (Tiun nobelan glavon li ja ŝtelis ie.)

Pli aŭdacan ĵurpromeson neniu eldiris ankoraŭ.

Sinjoro Gersono klinis sian kapon, poste la urbestro ekparolis hungare:

Ni informos la honestan gildestron pri via ordono, sinjora moŝto, kaj li certe klopodos fari ĉion eblan, por ke via volo plenumiĝu; sed en la nomo de la tuta urbo ni petas, ke via moŝto kune kun via glora armeo bonvolu resti ekster la nobela urbo, ĉar – kvankam nia opinio pri vi estas speciale favora – tiu stulta popolo tiomgrade timas la armitajn militistojn, ke rimarkinte la proksimiĝon de via armeo, ili parte diskurus en la arbaro, parte fermus sin en la preĝejo, do veninte en la urbon vi trovus nur senhomajn domojn, kaj tiel vi eĉ malebligus por ni kontentigi viajn postulojn, ja ni trovus neniun, kiu povus plenumi ilin.

Trajtzigfritzig kliniĝis al Borembukko por ion flustri al li, poste nelerte kaŝante sian rideton respondis:

– Honestaj sklavoj![64] *Estante timemaj kaj kiel stultuloj, same mi ne deziranta, ke okazantu forlasitaj viaj domoj estante neniu en ili, do vi revenantaj kaj dirantaj al la popolo, ke ni forirantu se ili revenantaj hejmen, poste do precipe, sed nur apenaŭ tuj ĉe la urbo mil paŝojn for ni ekripozantu, kaj vi devantaj bruligi kandelojn en ĉiu domo, por ke ni vidantaj, ke ĉiu estante hejme, alikaze se ne tiel, do malsame io estus povanta okazi, vi ja estos vidantaj, kio poste!*

La delegitoj informis la loĝantaron, ke ĉiu devas iri hejmen, kaj nokte bruligi kandelon ĉe la fenestro, kaj la loĝantoj eldonu ĉion valoran, kion ili ankoraŭ trovas en sia mizero por kontentigi la grandpotencajn loboncojn.

4.

Kaj okazis tiel. La gildoj[65] repenetris en la urbon, oni revokis la virinojn kaj maljunulojn el la arbaro, kaj ĝis malfrua vespero neniu ĉesis kuiri, baki, friti por la loboncoj. Nur la bela Klara petegis en la nomo de la junaj fraŭlinoj, ke ili ricevu permeson por pasigi la sekvan nokton ankoraŭ sub la protekto de Dio en la preĝejo, kaj la nobela konsilantaro konsiderante, ke ĉiu fraŭlino konkordas pri tiu peticio, aprobis tiun deziron.

La sekvan nokton brilis ronda plenluno, la tuta regiono ŝajnis kvieta. La estraranoj de la urbo ripozis trankvile en siaj baldakenaj litoj meditante pri tio, kiel saĝan diplomation ili praktikis por preventi la katastrofon de la urbo. La preĝejo protektis ĉirkaŭ tricent-kvindek virgulinojn per la potenco de Dio, kiam Klara en sia sonĝo pensis, ke ia figuro instigas ŝin grimpi al la supra etaĝo de la preĝejturo.

Kvankam duondormante, tamen senhezite ŝi grimpis supren laŭ la ŝtuparo al la subtegmento, kie pendis la kvin-tuna sonorilego de la preĝejo, kaj elrigardante tra la alta fenestro de la turo al la plenluna nokto, ŝi supozis vidi,[66] ke granda malhela makulo proksimiĝas al la urbo malrapide, poste ŝiaj okuloj sukcesis rekoni, ke tiu granda makulo estas grupo da homoj, ŝi eĉ rimarkis, ke en la malhela amaso kelkfoje ekbrilas klingoj de falĉiloj kaj lancoj sub la pala lunbrilo.

Ŝi tuj komprenis la situacion: la loboncoj atendis nur tion, ke la loĝantaro trankvile enlitiĝu en siaj domoj, poste la armeo laŭplane intencis surprizi ilin... Klara volis perdi eĉ ne unu minuton, ŝi ne reiris en la preĝejon, por veki siajn kunulinojn, sed laŭ subite elpensita ideo ŝi prenis la ŝnuron de la kvin-tuna sonorilego, por averti la tutan urbon per ĝia alarmsignalo.

La brakoj de la knabino estis malfortaj, sed plifortigis ilin la danĝero, kaj preninte la krudan ŝnuron per ambaŭ siaj blankaj manetoj, ŝi ekbalancis la pezan sonorilegon, kiun alifoje eĉ du viroj apenaŭ povis ekmovi, do antaŭ ol la malamikoj sukcesis atingi la urbon, la alarmsignalo laŭte eksonoris super la tegmentoj. La tuta loĝantaro, en la sama momento saltis el la litoj, la virinoj kaj maljunuloj kvazaŭ en interkonsento denove kuris en la arbarojn, la viroj iris en la korton de la fortika preĝejo tiel rapide, ke la loboncoj, kiam ili finfine atingis la urbon, trovis nur senhomajn domojn.

Trajtzigfritzig eksterordinare ekkoleris, ke oni tiel superruzis lin, kaj li ordonis, ke la urbo estu bruligita ĉe dek-du lokoj samtempe.

Sed liaj subuloj apenaŭ komencis plenumi tiun diablan ordonon, kiam la urbon trafis pluvego tiel abunda, ke ĝi tuj estingis ĉiun flamon. La bandestro de loboncoj pagane[67] sakris pro tiu malsukceso, damnis kaj dion kaj satanon.

Frumatene la respektindaj rektoro kaj urbestro denove vizitis lin. La bandestro permesis al ili diri eĉ ne unusolan vorton. Li kulpigis ilin, ke ili estas trompuloj, mensogemaj hundoj, kiuj misuzas la bonintencon de honestuloj, kaj li ĵurpromesis pasie, ke liaj kvar kanonoj ruinigos la tutan urbon, la preĝejon kaj la internulejon, la taĉmento glavbuĉos la loĝantaron, kaj la fraŭlinojn li disdonos inter siaj soldatoj, escepte, se oni transdonos al li tiun unusolan, kiu alarmis per la sonorilego.

– Tiu unusola fraŭlino estas ĝuste mia propra filino, respektinda sinjoro, – respondis profesoro Gersono letargie[68] –, tamen, se tiel mi povas aĉeti la saviĝon de mia urbo, mi nepre transdonos ŝin al vi. Nur tiun indulgeman favoron mi petas, ke bonvolu senkapigi min antaŭ ol miaj okuloj povus ekvidi ŝian malfeliĉon.

– Tiu favoro certe trafos vin! – konsolis lin Trajtzigfritzig, kaj samtempe li ordonis, ke la armeo ĉiuflanke invadu[69] la urbon. Li mem fiere rajdis sur sia ĉevalo, kaj la gvidrimenon enmanigis al la urbestro, tiel li paradis tra la stratoj, dum Borembukko ekrajdis sur la kolo de la profesoro, kaj tiel ridinde-timinde li atingis la vendoplacon pikante per spronoj la korpon de la respektinda, grizhara maljunulo.

La studentoj en la internulejo ĉion vidis bone, ĉar la marŝantoj haltis ĝuste antaŭ la konstruaĵo, sed la junuloj estis fermitaj, kaj la ŝlosilo de la pordego estis en la poŝo de sinjoro Gersono.

Poste ili devis vidi eĉ tion, ke antaŭ la preĝejo oni transdonas Klaran, la kvazaŭ duonmortintan knabinon, la filinon de la rektoro, kaj Trajtzigfritzig levas ŝin sur la ĉevalon.

Sed tio jam estis io pli terura, ol afero tolerebla por studenta koro.

Mi mortigos la tutan mondon! – kriegis Zetelaki kvazaŭ senkonscie, –, mi mem mortigos ilin ĉiujn! – kaj li, kiel uragano, kuris malsupren sur la ŝtuparoj. Lin tuj sekvis Arono, poste la tuta kompanio de studentoj; ili dum momento levis kaj deprenis la pezajn tabulojn[70] de la pordegoj, en la sekva momento la amaso de svarmantaj studentoj inundis la loboncojn antaŭ la preĝejo, kiel furioza abelaro incitita.

Ili tenis en la manoj nenian armilon krom bastonoj, sed dum la primitivajn pafilojn de la loboncoj senpovigis la pluvego, la dikaj batiloj fariĝis pezaj en la studentaj manoj pro la ribelanta kolero. La grupo de loboncoj baldaŭ estis premita al la muro, kaj la botistoj, kiuj je la unuaj batalkrioj sangavide kuraĝiĝis, komencis bombardi[71] ilin per ŝtonoj.

La du estroj rimarkinte la danĝeron de la situacio ne traktis la aferon, kiel ŝercon;[72] tuj kiam ili vidis ke la loboncoj faladas sub la batoj de la studentoj, ili turnis dorson al la batalantoj, kaj klopodis fuĝi el la urbo. Trajtzigfritzig brakumis la knabinon, tiel li portis ŝin kvazaŭ glutante ŝiajn vidindajn membrojn per siaj okuloj. Borembukko siaflanke kaptis sinjoron Gersono je lia kolumo kaj trudis[73] lin veni – brave kurante per siaj longaj kruroj.

Pli rapide, ol oni povus rakonti, la taĉmento de loboncoj estis dispelita al ĉiu direkto de la mondo. la du bandestroj jam kuris al la najbara urbo Felvinc kun ne pli da subuloj, ol eble tridek, sed ilin senĉese persekutis amaso da studentoj kun refalditaj manikoj kaj svingataj bastonoj. La longajn nigrajn togojn[74] ili ĉirkaŭfiksis per la zonoj, kaj kelkfoje subtenante sin per la bastonoj ili faris longajn saltojn, kiel nobla ĉevalo de angla deveno.

Daŭre malkreskis la nombro de persekutantoj kaj persekutatoj, foje unu, foje alia trovis sian kontraŭulon, kaj tiuj jam postrestis por batali. Fine restis nur du paroj: antaŭe Trajtzigfritzig kaj Borembukko, kaj ilin persekutis Jozefo kaj Arono. Unu el la loboncoj rajdis, la alia fidis siajn longajn krurojn, sed la ĉevalo laciĝis pro la duobla ŝarĝo, kaj kiam ili alvenis al la menciita rivereto, evidentiĝis, ke oni ne povas trapasi ĝin, ĉar la akvofluo, kreskinta pro la pluvego, detruis la ponton, kaj la akvo ondis super la bordoj.

– Nu, lobonco – kriis Arono, kiam li atingis la piedkuranton – por vi jen, la fino de la mondo![75]

Borembukko vidante, ke li jam nepre devas halti, ellasis la kolumon de sinjoro Gersono, prenis sian buĉhakilon, kaj per ĝi celis bati Aronon tiel forte, ke la knabo nepre estus dishakita, se li ne forsaltus ĝustatempe; sed la studento rebatis per la

bastono, kaj trafis la ungojn de la lobonco tiel, ke li tuj faligis la buĉhakilon. Tiam la lobonco, kiel tigro, kuratakis la knabon svingante jam nur la nudajn manojn, kaj vane la junulo trafis lian kapon per la bastono tiel, ke la batilo fleksiĝis, kaj la kapo de la lobonco tuj ŝvelis kiel dika panbulo,[76] li – kvazaŭ la bato ne koncernus lin – kaptis la bastonon de Arono por torde-perforte depreni ĝin, sed ankaŭ la knabo tenis sian batilon ambaŭmane, do en tia pozicio ili komencis tiradi-puŝadi unu la alian. Tio daŭris kelkajn minutojn, fine ili ambaŭ laciĝis, kaj komencis fiksrigardi okulojn kontraŭ okuloj.

Nu, studento, – diris la lobonco kun grincigo[77] de la dentoj –, vi trovis kontraŭulon teruran por vi; ĉu vi scias, kiu kaptis vin? Mia nomo estas Bo-rem-buk-ko!

– Bagatelo, – respondis Arono – mia propra nomo estas eĉ pli terura ol la via, ĉar mia nomo estas Ka-ras-si-a-i!

– Ĉu Ka-ras-si-a-i? – kriis la lobonco ĉagrenita,[78] – jen la fatalo,[79] same via, kiel mia! Tion dirinte li ektiris sian kontraŭulon tiel, ke ili ambaŭ falis de la alta bordo en la ŝvelintan rivereton, kaj la akvo plaŭdis super iliaj kapoj.

Dum tiuj eventoj ankaŭ Jozefo atingis la kanajlon, kiu rabis Klaran, kaj tiu rajdanto komprenante, ke fuĝi li jam ne povas, elseliĝis, eltiris sian glavon, kaj turnis sin al Jozefo, kiu proksimiĝis kun muta kolero.

– Forportu vin hejmen, por ke via patrino mamnutru vin, bastardo![80] – li kriis al la adoleskulo havanta vizaĝon ankoraŭ senharan – ĉu mi detranĉu viajn brakojn kaj krurojn?

Jozefo ne respondis, nur kraĉis al la manplatoj, kaj preninte la bastonon ĉe la mezo paŝis al la bandestro ignorante lian timindan mienon.

– Diable, ĉu vi restas ankoraŭ? – li kriis en freneza kolero, kaj lia glavo terure siblante celis la knabon, sed ankaŭ la bastono moviĝis fulmorapide, kaj unu ĝia flanko forpuŝis la glavon, kiu laŭte tintis, la alia flanko batis la kaskon, kiu laŭte klakis!

Ekturnis sin la mondo ĉirkaŭ la kapo de Trajtzigfritzig, kaj li nur gapis ĉiudirekte, kvazaŭ li esplorus, kie estas la batinto, sed lin serĉi estis superflue, ĉar Jozefo ĝuste antaŭ li prenis jam la finon de la bastono, kaj batis lin ĉe la talio tiel, ke li surteriĝis, kaj la glavo falis el lia mano. Poste li ankoraŭ klopodis tiri sian korpon ĝis la ĉevalo, sed Zetelaki pensante, ke li volas murdi la senkonscian amatan knabinon, ligitan al la ĉevalo, kuratakis la loboncon, kaj per piedo repuŝinte la kanajlon per la lasta bato mortigis lin.

Nur tiam li ĉirkaŭrigardis serĉante siajn kamaradojn. Ili ĉiuj postrestis, nur pendanta angulo de iu togo, kiu kroĉiĝis al branĉo de arbusto, vekis la konjekton, ke sub ĝi, en la rivereto troviĝas iu. Jozefo tuj kuris tien, kaj preninte la togon per ĝi tiris Aronon el la akvo. La knabo kaj Borembukko ankoraŭ tenis unu la alian, kvankam la studento vivis, sed la lobonco jam estis mortinta.

Poste ili kune kun sinjoro Gersono akvumante vekis Klaran el ŝia sveno, trankviligis ŝin per afablaj vortoj, kaj ili jam kvarope sur genuoj[81] dankis Dion pro la saviĝo.

Kaj tiujn du bastonojn, la dehakitajn branĉojn de salikoj, ili pikis en la ŝlimon de la rivereto, sinjoro Gersono benis ilin same, kiel ankaŭ la korinklinon de Jozefo, kiu neniam plu devis apliki teleskopon, kiam li deziris vidi Klaran.

Post tiu historio jam pasis cent jaroj kaj ankoraŭ kvindek, kaj la du salikoj ekde tiam daŭre kreskigas siajn verdajn foliojn ĉe la bordo de la rivereto. La internulejo

iam konstruigis ĉe ili komfortan amuzejon, kiun la studentoj vizitis en belaj someraj tagoj, tie ili rakontadis la historion pri tiuj du salikoj, kaj kantis la psalmon: "Dio estas nia firma fortikaĵo!"[82]

1. Nagyenyed – prononcu proksimume: "naĝenjed". Hungara nomo de urbo en Transilvanio, situanta en la nuntempa Rumanio. Rumane: Aiud.

2. La tuta nomo de la urbo "Nagyenyed" (prononcu: "naĝenjed") laŭvorte signifas "granda Enyed", ĉar ekzistis du lokoj kun la sama nomo "Enyed". Unu el ili estas vilaĝo, la alia urbo. Por evidentigi, ke temas pri la urbo, oni oficiale aldonas "granda", sed kiam miskompreno ne estas verŝajna, sufiĉas la mallonga nomo "Enyed" (prononcu proksimume: "enjed")

3. La koncernaj eventoj okazis en 1704. La rakonto estis verkita en 1853.

4. Tiutempe Hungarion regis la Habsburga dinastio, kaj sin levis ribela partio, kiu volis liberiĝi de la Habsburgoj per milita revolucio, ili nomis sin hungare "kuruc". La etimologio de tiu vorto estas nekonata, sed ekzistas supozo, ke ĝi devenis el la latina vorto "crucifix", rekte el la nomoj "krucmilito", "kruckavaliro", do mi esperantigis ilian nomon laŭ tiu supozo jene: "kruculo".
La alia milita partio persistis por la regado de Habsburgoj, oni nomis ilin hungare "labanc". La vera etimologio de tiu vorto same ne estas konata, sed ekzistas opinio, ke ĝi devenis el la hungara vorto "lobonc", kiu onidire aludis al la perukoj de aŭstraj soldatoj, do mi esperantigis la vorton jene: "lobonco", kiu vorto estas pli nature prononcebla por nehungaroj, konsidere,

ke la koncerna hungara vokalo "a" tute ne ekzistas en Esperanto.
5. trudi – perforte/perpotence devigi iun, ke li konsentu/plenumu ion,
6. dekreto – ordono deviga, kiel leĝo
7. rivalo – unu el tiuj, kiuj klopodas superi la alia(j)n.
8. La oficiala titolo de regantoj, kiuj pli frue regis super Transilvanio latine estis "princeps". La ĉefa militestro de kruculoj, Francisko Rákóczi, estis ilia posteulo, kiu uzis la saman titolon.
9. La eventoj de la rakonto okazis en Transilvanio, kiu tiutempe estis hungara teritorio, tamen konsiderata pli-malpli memstara regno, do el tiu vidpunkto la ĉefa parto de Hungario estis "ekstere".
10. rajdveturantaj piedsoldatoj – laŭ faka termino: "dragonoj", sed tiun vorton oni fakte eĉ en la gepatra lingvo ne komprenas, nur tiom, ke "iaspeca soldato". **Vidu en Vikipedio**

11. Tiuj mizeraj militistoj malofte havis ordinarajn armilojn, do ili batalis per diversaj laborinstrumentoj. **Vidu falĉilon en Vikipedio**

xx. hordo – (ĉi-kaze) senorda, malbonfara grupo
12. Referenco: Historia libro de s-ro Miklósvárszéki Nagyajtai Cserei Mihály 1661-1711.

13. La nomo en la originalo estas "Balika", sed mi konsideris, ke ekzistas ankaŭ alia nomo simila al ĝi: "Balikó", kies finaĵo pli bone adaptiĝas al Esperanto, do mi esperantigis tiun nomon jene: "Baliko".
14. Intermonto de Torda – hungare: Tordai-hasadék; rumane: Cheile Turzii;

15. Kampario (regiono de kamparo) – hungare: Mezőség; rumane: Câmpia Transilvaniei. Mi verdire tradukis la nomon de la regiono, imitante

ankaŭ la rumanan nomon, por ke ĝi pli bone adaptiĝu al la esperantlingva teksto. La vaste uzata geografia nomo "Transdanubio" enhavas tre similan logikon, kvankam ĝi devenis el la latina lingvo.
16. La nomo en la originalo estas Bórembukk, ĝian fonetikon kaj ortografion mi parte adaptis al Esperanto.

17. internulejo – komuna loĝejo kaj (ĉi-kaze) lernejo de studentoj, kiuj ne volas aŭ ne povas iradi hejmen por tranokti.
18. Vangofrapo ekde la antikvo havis ritan signifon kun diversaj klarigoj. La rita kutimo devenis rekte el la ceremonio de kavalirigo, kiam oni vangofrapis la kandidaton dirante: jen, la lasta insulto, kiun vi devas toleri sen venĝo. Vangofrapo en diversaj popolaj tradicioj ofte estis parto de ceremonio, kiam la komunumo solene akceptis junulon, kiel plenrajtan plenkreskulon. Aperis ankaŭ la motivo, tiamaniere elpeli de li damaĝajn demonojn.
19. Forinto tiutempe havis multe pli altan valoron, ol nun.
20. klera – altnivele edukita kaj kvalifikita
21. La originalo mencias "akademiojn", sed en Esperanto "akademio" signifas ne edukan institucion. Evidente temas pri universitatoj kaj/aŭ altlernejoj.
22. Laŭ originala ortografio kaj vicordo: Tordai Szabó Gerzson. "Gerzson" estas la persona nomo, kiun surbaze de la hebrea deveno mi esperantigis jene: Gersono.
23. En la originalo temas pri foliantoj, sed konsiderante, ke la kunkudritaj foliantoj nomiĝas "kodekso", mi uzis tiun lastan, pli vaste uzatan vorton.
24. Stikso – mitologia rivero en la regiono de mortintoj (Ŝeolo), kie Karono, la pramisto, perboate veturigas la mortintojn al ilia eterna restadejo.
25. humanissime – latina titolo por senrangulo kun la signifo: "tre humana viro"
26. Laŭ originala ortografio kaj vicordo: Zetelaky József
27. Laŭ originala ortografio kaj vicordo: Karassiay Áron
28. Organikajn objektojn, ekzemple insektojn, bestajn organojn, fruktojn ktp. oni povas longe konservi en esenca alkoholo.
29. ĉasta – (ĉi-kaze) sendependa de seksaj aferoj aŭ amrilatoj
30. Heraklo – duondio en la helena mitologio, simbolo de la bonintenca fortego.
31. Dejnira – la edzino de Heraklo
32. Temas pri la duonsferoj de Magdeburgo, pri la fama eksperimento de Otto von Guericke. **Konsultu Vikipedion**
33. Ankoraŭ ne ekzistis la vorto "gaso", do ĉiun gason oni nomis "aero".
34. delekti – tre plezurigi
35. laŭbo – artefarita volbo en ĝardeno el vivaj kreskaĵoj ordinare subtenata de speciala framo.
36. Sapfo – helena poetino, kiu plej ofte verkis pri amo kaj amoro
37. Kiam la rakonto estis verkita (en 1853), ekzistis evidente nur sep

virinaj gazetoj en Hungario.
38. la jena – ĉi tiu
39. fajrobatilo – longa stango kun peza kapo, per kiu okaze de brulego oni disbatis obstaklojn aŭ la brulantajn objektojn por pli facile estingi ilin.
40. bedo – fosita loko en ĝardeno por malgrandaj plantoj, ofte pli alta, ol ĝia ĉirkaŭaĵo.
41. komploto – sekreta interkonsento pri malica aŭ krima celo kontraŭ iu (ĉi-kaze kun ironia/ŝerca nuanco).
42. En la originalo ĉi tie estas ankaŭ aludo, ke li ordonis al sia bando enseliĝi, sed en ĉiuj aliaj partoj de la rakonto estas evidenta, ke neniu havis ĉevalon krom la estro, eĉ ne la vicestro, do mi konsideris tiun propozicion simpla eraro, kaj ne tradukis ĝin.
43.
44. gildo – organizo de metiistoj. **Konsultu Vikipedion!**
45. Mi ne tradukis komplete ĉiujn profesiojn, ĉar multe da ili jam eĉ propralingve ne estas vaste konataj.
46. alo – (ĉi-kaze) flanka konstruaĵo, longeca parto de granda konstruaĵo.
47. La demandsigno kompreneble rilatas al la ĉefpropozicio de tiu kompleksa frazo: "Ĉu tial mi instruis al vi tiom da sciencoj".
48. togo – (ĉi-kaze) tre longa, malstrikta, nigra, mantelforma vesto. **Vidu la togojn de studentoj!**
49. Pajno – helena dio de paŝtistoj
50. gaŭlo – arkaike "gallo", ano de antikva popolo
51. Enjed estis tielnomata "nobela urbo" havanta specialajn rajtojn, ricevitajn de la reĝo, ekzemple ĉiuj ĝiaj civitoj sen aparta procedo fariĝis nobeloj.
52. stuporo – senpova stato pro ektimo, traŭmo ktp.
53. En la originalo verdire temas ne pri la pli frue menciita rivereto, sed pri la same proksima rivero Maros (prononcu proksimume: "morôs"). Rilate al la rakonto tio tute ne gravas.
54. togo – ĉi-kaze tre longa, malstrikta, nigra, mantelforma vesto. **Vidu la togojn de la studentoj!**
55. lignokorpa kanono – temas pri anekdota primokado de rivalaj urboj, armeoj ktp. Pluraj variantoj de tiaj popolaj anekdotoj ekzistas, kiuj asertas,

ke la stultaj rivaloj faris kanonon el ligno, kiu kompreneble ne povas funkcii. **Legi hungarlingvan anekdoton pri ligna kanono!**

56. maŝkiraso – korpoŝirmilo, farita el drato aŭ el kunkroĉitaj ĉeneroj.

57. pasamento – ornamaĵo sur vesto, farita el ŝnuretoj, fadenoj aŭ rubandoj, ofte el valora materialo (silko, orfadenoj ktp.)

58. kvastoganto – metala ganto, parto de kiraso.

59. monogramo – la komencliteroj de la posedanto por marki propran objekton

60. Laŭ originala ortografio kaj vicordo: Tóth János

61. Enjed estis tielnomata "nobela urbo" havanta specialajn rajtojn, ricevitajn de la reĝo, ekzemple ĉiuj ĝiaj civitoj sen aparta procedo fariĝis nobeloj.

62. gildo – organizo de metiistoj → gildestro – ĉefo de tia organizo.

63. ĵuri – preni dion aŭ ion sanktan, kiel atestanton → ĵurpromesi – promesi ion tiumaniere

64. Ĉi tie la primitivulo provas imiti la inteligentan parolmanieron de la profesoro, sed li kompreneble parolas nur sensencajxojn, kvankam oni povas diveni, kion li deziras esprimi.

65. Kompreneble temas pri la metiistoj, kiuj estis anoj en iu gildo.

66. ŝi supozis vidi – la knabino supozis, ke ŝi vidas tiun makulon, sed komence ŝi ne estis tute certa, ĉu la okuloj ne trompas ŝin.

67. pagane – kiel paganoj (ĉi-kaze) krude, primitive
68. letargie – en animstato senpova pro ĉagreno
69. invadi – grandnombre plenigi, okupi landon, teritorion, regionon, urbon ktp. precipe militante.
70. pli precize "alojn", sed mi pensas, ke la vaste konata vorto "tabulo" estas tute klara en la kunteksto. La aloj de pordoj ja esence estas lignotabuloj kun ĉarniroj kaj manilo. (Seruro ne estas nepra apartenaĵo.)
71. bombardi – elpafadi obusojn aŭ faligi bombojn → ĉi-kaze (figure): senĉese ĵetataki.
72. "ne traktis la aferon, kiel ŝercon" – ne reagis tiel, kvazaŭ la danĝero estus malgrava.
73. trudi – perforte/perpotence devigi iun, ke li konsentu/plenumu ion.
74. togo – ĉi-kaze tre longa, malstrikta, nigra, mantelforma vesto. **Vidu la togojn de studentoj!**
75. por vi jen, la fino de la mondo! – dusenca frazo signifanta: 1. "vi ne povas iri plu" 2. "finiĝos via vivo"
76. panbulo – ronda bakaĵo plej ofte el tritika faruno, pli granda ol bulko, sed malpli granda ol ordinara pano.

77. grinci – eligi sonon, kiel du vitropecoj kunfrotitaj → grincigi – kaŭzi tian sonon per kunfrotado de objektoj, taŭgaj por tio → grincigo – tiu ago
78. ĉagreni – malfeliĉigi → ĉagrenita – malfeliĉega, senespera
79. fatalo – neevitebla malbono aŭ pereo, kiu estas fiksita en ies sorto
80. bastardo – homo, kies gepatroj ne estis laŭleĝaj geedzoj. Tiu titolo estis grava ofendo.
81. sur genuoj – genuante
82. Psalmo numero 46: danko pro la saviĝo. Kanto de Marteno Luther. Por kanti laŭ la melodio, la nombro de la silaboj tiel konformas: "Dio estas fortikaĵo". **Aŭskultu la kanton de la studentoj!**